

La solidara projekto Pontoj de Amo instigas prezidenton Biden ?esigi la blokadon al Kubo.



Va?ingtono, jul 28 (RHK) La solidara projekto Pontoj de Amo transdonis al la usona registaro peticion subtenatan de pli ol 27 000 subskriboj, en kiuj ili instigas prezidenton Joseph Biden ?esigi la blokadon al Kubo.

La ?efa kunordiganto de la iniciato, Carlos Lazo, diris al la informagentejo Prensa Latina, ke kiam li akceptis la peton ?esigi la sankciojn sur la insulo, li parolis kun la vicsekretaria asistanto pri Aferoj de Okcidenta Hemisfero de la ?tata Departemento, Emily Mendrala.

Ni klarigis al la oficialulo la bezonon reaktivigi la Va?ingtonan ambasadon en Havano, normaligi konsulajn servojn kaj rekomenci la programon pri familia reunui?o, diris la aktivulo en ekskluzivaj deklaroj al ?i tiu nova?agentejo.

Same, ni emfazas la gravecon restarigi flugojn de Usono al ?iuj kubaj provincoj, forigi limigojn, kiuj malebligas al usonaj civitanoj viziti la insulon, kaj faciligi la senliman sendadon de mense?oj al la kariba nacio, li aldonis.

La? Lazo, ?e la kunveno regis respekto kaj en tiu scenejo ili pensis pri la politika kosto de la strategio provi konvinki tiujn, kiuj vo?donis kontra? Biden en la prezidentaj elektoj, por ke ili nun ali?u al la flanko de la demokratioj anta? la le?donaj elektoj meznivelaj en la periodo en 2022.

Tio povus esti malbona decido, diris la kuba-usona profesoro, kiu opinias, ke la prezidento devas plenumi sian kampanjan promeson restarigi la politikon de eksa ?tatestro Barack Obama (2009-2017), periodo en kiu la nuna prezidento estis vicprezidento.

Se vi elektas tiun vojon, via hereda?o estos de paco, de konstruado de dialogo, alie ?i lasos spuron de detruo ne nur por la popoloj de Kubo kaj Usono, sed anka? por via Demokrata Partio pro neplenumo de via promeso, emfazis la gvidanto de Pontoj de Amo.

Mendrala asertis, ke ?i vekos zorgojn, por ke tiuj 27 mil vo?oj estu a?dataj.

Lazo, kiu estis en ?i tiu ?efurbo de la pasinta diman?o, kie li alvenis post dumil kilometra promenado de Miami, Florido, inter?an?as ?i tiujn tagojn kun politikistoj kaj kun la usona gazetaro pri la bezono fini la blokadon, plifortigitan meze de la nuna pandemio de Kovim-19.

La anta?an tagon li aliris la respublikanan senatanon Ted Cruz, unu el la plej reprezentaj figuroj de la kontra?kuba premgrupo en Usono, ekster Kapitolo kaj petis lin ?an?i sian pozicion al la kariba lando, sen interveno.

Solidaraj agoj kiel tiuj de Pontoj de Amo ekestas, dum la norda nacio profitas el la malfacila ekonomia situacio en Kubo ka?zita de la sie?o de Va?ingtono kaj la sanstato pro la malsano, por anta?enigi malstabiligan kampanjon, denuncas la kubaj a?toritatoj.

fonto:PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/265313-la-solidara-projekto-pontoj-de-amo-instigas-prezidenton-biden-cesigi-la-blokadon-al-kubo>



Radio Habana Cuba